

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

1946

39-a jaro N-ro 493 (1)

Januaro-Februaro

(Fondita 1904, ne aperis dum 1943-45)

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redaktoro: Hans Jakob
Palais Wilson
Genève, Svislando

ENHAVO:

Enirante novan epokon	1
Universala Esperanto-Asocio dum la tutmonda milito	2
La helpo al la familio Zamenhof	4
Lingvaj studoj: Ĉu bohema, ĉu ĉeĥa	4
Kie estas kiu?	5
Bibliografio de Esperanto	6
Universala Esperanto-Asocio Oficiala Informilo	7-8
Korespondado	8

Jara abono Fr. sv. 10.—
(Kun ricevo de la jarlibro & premio)
. Anonco:
Korespondado du linioj 1.—
. Reklamo:
Kolonero unu centimotra 1.—

Poŝtĉeko svisa: Genève I 2310
Poŝtĉeko belga: Bruxelles 184200
Poŝtĉeko franca: Lyon 221-76
Poŝtĉeko sveda: Göteborg 44381
Bokförlaget Kosmos
för Universala Esperanto Asocio

Enirante novan epokon.

Forflugis la ĝojo, ke finis la milito kaj cedis lokon al realisma konsidero de la situacio. Ĉie ruinoj, tiom materiaj kiom moralaj. Detruitaj estas tutaj landoj, detruitaj estas la rezultatoj de homa penado, krei mondon pli bonan kaj pli justan. Povas esti, ke la materia rekonstruo efektiviĝos pli rapide ol la morala. La mondo, (t.e. la homoj) iĝis skeptikaj pri ĉio, ja eĉ pri si mem. Malfacile estas influi la mondon kredi je la bono kaj gajni ĝin por la agado de bonvolo intergenta.

Inter la viktimoj de la superbordiginta naciismo troviĝas nia movado. Se la milito daŭris preskaŭ ses jarojn, tiam ni Esperantistoj gvidis militon, de ekstere ne rimarkitan, jam de la jaro 1933. La reĝimo de la NOVA ORDO, akre persekutis Esperanton kaj ĝian movadon. Nur centprocentaj naivuloj povis kredi ke Esperanto povos ekzisti sub tia reĝimo. Necesas ke oni spertu, por ŝanĝi opinion.

La diferenco inter la militfino 1918 kun tiu de 1945 estas tranĉa. Siatempo nia movado ne estis persekutita, ĝi povis rapide repreni perditan pozicion kaj entrepreni ĉion, kion postulis la nova situacio. Male en 1945! La milito, la kirlado de milionoj da homoj, la ekstermo de ĉio kio rilatas nian movadon en multaj landoj havos sekvojn, ne forviŝeblajn rapide. Kaj ni devas rekonstrui ĉion.

Konscia pri la graveco de la horo la Estraro de Universala Esperanto-Asocio, decidis reaktivigi la Asocion, restarigi ĝiajn servojn sinsekve, kaj regroupigi la dissemittajn samideanojn. La nova epoko, la malriĉiginta mondo devigas trovi novajn metodojn. Ĉio devas adaptiĝi al la nova situacio, alie nia movado vegetos sed ne vivos. Ekzistas du internaciaj organizaĵoj, kiuj faras la samajn servojn, eldonos jarlibrojn, periodaĵojn, funkciigos oficejojn, okupigas oficistojn. Tiu ĉi paraleleco ne plu respondas al la nuna stato. UEA deklaras sin preta, ekzameni seriozan proponon pri novarango de la internacia organizo kaj siaflanke konsideras la proponon faritan de UEA en Varsovio 1937 kiel taŭgan bazon.

Universala Esperanto-Asocio.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

dum la tutmonda milito 1939-1945

Antaŭsignoj.

La dua tutmonda milito kiun ni travivis ne surprizis nin. Jam jardekon antaŭe klarvida homo vidis veni la katastrofon. Paŝon post paŝo la forĝistoj de pretendita nova ordo efektivigis la gigantan planon estri ne nur Eŭropon sed la tutan mondon. Kaj fine eksplodis la milito!

Male je la situacio en 1914, tiun ĉi fojon, Svislando preparis sin por respondi al duobla minaco, la konkero per la norda najbaro kaj la malsato. Jam en 1935 la respondecaj povoj de la lando pligrandigis la batal-potencialon de la armeo kaj en 1938, ĉio estis sisteme preparita por provizi la landon je la necesaj krudmaterialoj kaj nutraĵoj por longa tempo. La loĝantaro devis starigi stokon da nutraĵoj, laŭ donita skemo, la grandaj organizaĵoj de konsumo plenigis la provizejojn. La materian preparon paralelis morala defendo kontraŭ la brua propagando de la Tria Regno kaj de siaj ne malmultnombraj agentoj. Ne nur defendi la malgrandan landon, sed kulturi ĝin por tiri maksimumon el ĝi, estis plia armilo en la duobla batalo kiun gvidis la svisa popolo. Kaj ĝi sukcesis! La svisa popolo preterpasis la katastrofon kiu falis sur aliaj kaj estas eta ero de dankemo, se ĝi povis mildigi la suferojn de la najbaroj, per praktika helpo al viktimoj.

Necesas ĉi tiu skizo de situacio por pli bone kompreni la sintecon de nia UEA komitato kaj estraro, kiu jam en 1937 ekkomencis sisteme prepari ĉion por ĉia eventualeco. Neniam oni sentis sin sekura, ĉiutage povis okazi la surpriz-atako. Kiam montrigis tute klare ke la „paco por nia tempo” (peace for our time!) estas ĥimero, nia Estraro petis de la komitato de UEA plenpovon, per laŭ jure ne rifutebla dokumento, tiel ke en okazo de nepra bezono, la svisaj komitatanoj povu agi laŭ ilia bontrovo.

Servo de perado.

La impona servo de perado dum 1914-1919 ja ne ripetigis je sama amplekso. Sed spite ŝanĝitaj cirkonstancoj, la **servo de perado** starigita ree en 1939 kaj funkciinta ĝis 1940, plenumis konsiderindan laboron, peradante milojn da korespondaĵoj al civiluloj en la militantaj landoj.

Pro la blokado de Svislando kaj la el ĝi rezultiginta poŝta kontrolo per la germanoj, tiu ĉi servo grade malgrandiĝis. Aliflanke, por eviti ĉian eblecon de subtera agado (kvina kolono!) la aliancaj ŝtatoj siavice limigis la korespondadon tra Svislando.

Same kiel en jaroj 1914-19 ankaŭ ĉi-tiun fojon, nia Asocio plenumis praktikajn servojn dank'al kunhelpo de bonvolaj Delegitoj. Konsiderindan helpon ni alportis al pluraj centoj da rumanaj familioj, por kiuj nia oficejo peradis bankavizojn el Usono, servo farita ekskluzive per radiogramoj kio vekis eĉ suspekton ĉe nia milita aŭtoritato.

Konsiderinde estis ankaŭ praktika arango, kiun ni kreis peradante pakaĵoj al civiluloj fremdaj, internitaj en Germanujo, personoj surprizitaj per la militeksplodo kaj senditaj hejmen nur post unujara restado mallibervola. Citinda estas ankaŭ nia helpo al polaj maristoj atingintaj britajn havenojn. La spertoj akiritaj en 1914-18 multe helpis, ĉar ni zorgis notis la adresojn, tiel ke ĉia ebleco de nelojala ago estu malhelpata. Kiam la situacio fariĝis minaca, ni detruis aktaron, el kiu la serĉema (kaj ne ŝercema!) GESTAPO estus povinta malutili al niaj protektitoj. Oni ja lernis ion el la spertoj de la aliaj kaj sciis tion valorigi.

Esperantista Interhelpo.

Tiu ĉi servo, kreita ekskluzive por helpi al la viktimoj esperantistaj de la teroro en la Tria Regno etendiĝis grandskale. Sed nur malmultaj samideanoj sukcesis forlasi la malgasteman teron de tiu ĉi regno. Tro komplikaj estis la kondiĉoj de eliro kaj de eniro, vera heroeca luktado kontraŭ homa ĉikanemo kaj ekstrema formalismo. Nur tiu, kiu mem okupiĝis pri tia servo kiu kuris kurag'plene kaj konfide de konsulejo al konsulejo, povas kompreni la animstaton de rifuĝintoj, jam kredintaj sin savitaj. Ke UEA provis helpi al multaj rifuĝintoj en la jaroj 1936-1942 estas dankata ankaŭ al la spertoj kiujn akiris la administranto, deĵorinte dum kelka tempo en registara servo, oficejo okupita pri la kontrolo de la rifuĝintoj.

Distingaj esperantistoj, helpitaj aktive de la Esperantista Interhelpo estis interalie, D-ro Walter Lippmann, akademiano, D-ro Solzbacher, (Katolika E-movado) Bernhard Selzer (Vieno), Jaume Grau Casas el Barcelona, kaj aliaj. Okaze ni publikigos la liston de ĉiuj „klientoj” de la Esperantista Interhelpo, servo nur ebla dank'al la solidareco esperantista.

L' gvidanto de la Esperantista Interhelpo, spite avertoj ne sin montri en la Tria Regno pro farita denunco, plurfoje vojaĝis tien por organizi forkuron de konataj viktimoj, ni citu nur Nikolaon HOVORKA, (Vieno) arestita en 1938 kaj retenita en Dachau ĝis 1942.

Sed la plej atentindan helpon, UEA organizis por savi la familion de nia Majstro, la filon, ties edzinon kaj Ludovikon, la nepon de la kreinto de Esperanto, F-inojn Lydia kaj Sofia Zamenhof. La

Helpe al Familio Zamenhofa

estis nur ebla dank'al la specialaj kondiĉoj de Svislando, al la laŭdinda sindono de aro de niaj delegitoj kaj fine al la oferemo de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Kiam ni sciigis en decembro 1939 pri la plendinda stato de la loĝantaro de Polujo, speciale pri la sorto de la juda gento, ni dissendis tuj alvokon (en Esperanto kaj en angla lingvo) subskribitan de svisaj samideanoj. La sukceso superis nian atendon. Sed niaj provoj ekscii ion pri la familio Zamenhof estis vanaj, ĝis fine venis la unua vivsigno, poŝtkarto germanlingva de Lydia Zamenhof kaj iom pli poste letero de Sinjorino Wanda Zamenhof. En fina raporto pri tiu ĉi metoda, regula sendado de nutraĵoj kaj de mono, ni konigos ĉiujn detalojn. Hodiaŭ ni diru nur, ke D-ro Adam Zamenhof malaperis en 1940 (arestita kun aliaj intelektuloj) ke malaperis en 1942 la fratinoj Lydia kaj Sofia Zamenhof. Estas vera miraklo ke Sinjorino Wanda Zamenhof savigis kun la filo, sed nur dank'al sistema ruzado, kaŝado kaj ŝanĝado de kaŝejoj. Dum junio 1945, post 15 monata silento, venis telegramo al ni, informante pri saviĝo tra la lastaj turmentoj. Kaj dum Oktobro 1945 pola kuracistino el Varsovio, D-rino Szymanska, veninta kun misio por infanhelpo al Svislando, alportis al ni mesaĝon de Sinjorino Z. (nuna nomo Zaleska) kies resumo estas ke ni helpu al ŝi trovi rifuĝon kun la filo en alia lando. Ŝia nuna adreso estas Wanda Zaleska, Mykotow Lowicka 39-A, Warszawa, Polujo.

La asocia agado de UEA.

Se dum la unua mondmilito, la propra agado de UEA daŭrigis proporcie al la limigoj devigitaj pro la militagoj, tiam en la jaroj 1939-45 la situacio estis tute alie. Nia movado estis paralizita jam jarojn antaŭ 1939, depost 1936 Esperanto malaperis en Germanujo, 1938 sekvis Aŭstrio, poste Ĉeĥoslovakio. Kaj post 1939 unu lando

post alia eligis el la koncerto. La fakta blokado de Svislando, in-
sulo de paco kaj libereco en la ondeganta NAZI-mar, igis iluzia
ĉian laboron por nia afero. La videblaj sekvoj de tiu ĉi blokado
estis la neebleco libere rilati kun Britujo, Ameriko kaj ceteraj
landoj. Ja eĉ kun Svedlando nia poŝtrilato fariĝis komplika, sen-
dajoj niaj ne alvenis plu jam en 1941. Alia sekvo estis la neebleco
ricevi monon el cititaj landoj (la kelkaj nemilitantaj landoj ne
sufiĉas por vivteni regulan agadon de UEA). Nia ĉefa penado estis,
daŭrigi la servon de interhelpo laŭ la eblecoj. Ni eldonis la gazeton
ESPERANTO ĝis 1942. Tiam evidentiĝis, ke ne havas sencon el-
spezi milojn kaj milojn da frankoj por dissendi gazeton, kiu plej-
grandparte riskis esti konfiskata de la poŝta kontrolo de l' „Wehr-
macht". Tiam la komitato decidis fermi la oficejon konservi kon-
takton kun ĉiuj, atendi la momenton por rekomenci. Laŭtempe tiu
ĉi decido koincidis kun la ekokupo de la Wilsona Palaco per ŝtataj
oficejoj, kio sekvigis la transiron de la internaciaj oficejoj el apuda
Hotelo Bellevue, kiu fariĝis la „Internacia Centro". (La adreso de
UEA tamen restis la sama, praktike la agado neniam ĉesis).

Alia paralelo kun 1914/1918 estis la ŝanĝoj en la personoj. Estis
en jaro 1915 ke UEA perdis sian unuan prezidanton, Harold Bol-
lingbroke MUDIE, „la naskita prezidanto", en 1916, sekvis lin
Théophile Rousseau „la filozofo de UEA", ambaŭ sur batalkampo
kaj en 1917 sekvis L. L. Zamenhof, la unua honora prezidanto
de UEA.

Kaj dum la dua tutmonda milito malaperis, Ed. Stettler „la ju-
risto de UEA" kunfondinto kaj sinsekve Direktoro, prezidanto,
honora prezidanto de la Asocio (1940), sekvata en 1945 de Re-
naud RICHEZ, „la akurata Delegito", ano de UEA de la unua jaro,
Delegito en Péruwelz, Belgujo, de 1915-1923 kunlaborinto en la
Centra Oficejo de UEA, komitatano kaj vicprezidanto post 1936.
Krom la cititaj komitatanoj la senkompata sorto forprenis Sinjoron
Baart de la Faille, (Arnhem), F-inon Helmi DREZEN (Tallinn) ek-
zekutita de la germanoj en 1941.

Longa estas la listo de la ceteraj fideluloj, kiuj mortis sur ba-
talkampo, en koncentrejoj, pro malsato. Iliajn nomojn ni konigos
en sekvontaj numeroj de ESPERANTO.

La Svisa defendkomitato de UEA, konsistanta el samideanoj H.
Kürsteiner, (K. M. Liniger, ĝis 1940), Renaud Richez, Charles
Rosen, H. G. Rotach kaj Hans Jakob kunvenis plurfoje dum la
milito. Dum januaro 1940 estis diskutita la neceso transporti la
bibliotekon de UEA al sekura lando kaj la Administranto entre-
prenis diversajn paŝojn. Alvenis propono de la Parlamenta Biblio-
teko en Washington, kiu deklaris sin preta akcepti la kolektojn kaj
daŭrigi ilin. La klopodojn pri tio ni konfidis al konata usona pio-
nirino de la mondlingva ideo, destinita pro sia rango por tia afero.
La evoluo de la „drôle de guerre" al la okcidenta milita kata-
strofo dum majo-junio 1940, ŝanĝis entute ĉion kaj restis al ni
nenio alia, ol atendi, ĉiam kun la minacanta Damokla glaveto de la
invado germana super ni. Ni konsciigis, ke je tiu ĉi eventualeco,
ni devis atenti, ke malaperu la aktaro pri la Esperantista Inter-
helpo, centoj da klasiloj povintaj liveri ŝatindan materialon al la
GESTAPO. Oni ne forgesu, ke UEA havis la honoron, esti citita
kiel organizaĵo malamika al la Tria Regno. Pri tiu ĉi detalo kaj la
rolo de certaj esperantistoj germanaj, ni okaze parolos) Resume
NI ESTIS PRETAJ JE ĈIU EVENTUALECO.

Necesis ke ni tion klarigu, ĉar iuj samideanoj, pli bonintencaj
ol informitaj, opiniis ke UEA devis fari tion kaj tion.

Skizinte la situacion dum militan, ni vole nevole devas tuŝi ankaŭ
la demandon pri la internacia situacio de nia movado. Ni estu
klaraj kaj ni ne lulu nin en revoj pri rapida repreno de rilatoj
kiel antaŭe, ekzemple kiel post 1918. Tro profunda estas la fo-
saĵo kiu dividas nun la mondon, tro forte gravurigis en la vizaĝo
de la nuntempuloj la signoj de l'travivaĵoj. Necesas nova generacio

kaj kun ĝi novaj fortoj. Al ni, malnovaj batalantoj apartenas la
tasko, retrovi unuecon kaj konkordon. Tiu ĉi postulo je unueco
estas jam pli ol matura kaj ĝi devas trovi solvon, kiu respondos
al la realeco. UEA estas preta ekzameni serioze ĉiun proponon,
respektanta certajn premiasajn nuntempe pli facile komprenatajn.
En taŭga momento ni informos la esperantistan publikon pri niaj
intencoj. Dume ni reprenos nian agadon prudente kaj decide. Ni
estas certaj, ke en tempo ne tro malproksima realiĝos la deziro de
ĉiu aktiva esperantisto, ke estu nur **unu internacia organizaĵo**,
kunigante la du tendencojn de la sendependa kaj nepolitika Espe-
ranto-movado. Tiam ni povos diri kun la poeto

*Disfalas la malnovo
Aliiĝas tempoj kaj nova viv,
ekfloros el ruinoj!*

Hans Jakob.

Bibliografio de Esperanto.

Unu el la servoj kiujn UEA restarigas nun estas la Bibliografia,
la sistema kaj metoda raportado pri la libraro por kaj en Espe-
ranto. Nur malmultaj libroj aperis dum la milito, ĉefe en Britujo,
Svedlando, Portugalio kaj Brazilio.

Citinde estas, ke la svedaj Esperantistoj klopodegas aperigi
interesajn librojn kaj inter ili ni citu tiun de l'Grafo Folke Berna-
dote „La fino", (la lastaj tagoj de la diktatoreco Hitler'a).
Estas dezirinde ke tiu ĉi libro trovu vastan interesularon, precipe
en landoj kie ne aperas traduko en la propra lingvo.

Novaj libroj.

Rousseau C. De Babel à Ariane. Ce qu'il faut savoir sur la
langue mondiale. (Propaganda broŝuro en franca lingvo pri nia
movado, kun ilustraĵoj) 19×12,5 cm, 24 p. — Paris 1945 —
Imprimerie J. Polgar, 33 rue Lacépède, V.

Pensoj de Zamenhof. Tradukitaj el Esperanto, la internacia
helplingvo tutmonda. — Français, english, deutsch, italiano,
20×12,5 cm, 32 p. — Eldonis Svisa Esperanto Societo, Bern
1945. Presis Büchler & K-jo, Bern.

Estis bonega ideo, kompili kelkajn pensojn de nia Majstro, kun
sekvanta traduko en la kvar cititaj lingvoj, sub formo de senten-
coj. Ni gratulas la kompilanton pro la neta laboro kaj deziras al
la kajero, bele presita vastan legantaron.

Tipoj kaj aspektoj de Brazilo. Originaloj el la Brazila revuo de
Geografio. Tradukitaj de membroj de Brazila Ligo Esperantista.
27×18,5 cm, 152 p. (Ilustrita) — Rio de Janeiro 1945. Presejo
de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

A. Brigole Santos — Dumont, la aerpioniro — Espe-
rantigis Maria de Amaral Malheiro — 24×16 cm, 32 p. (Kun arta
kovrilo, ilustrita) — Rio de Janeiro 1945, eldonita de la Mini-
sterio por Eksterlandaj Aferoj. Presis Irmaos Pongetti, R. Saca-
durura Cabral, 240a.

Que é o Esperanto? Publicação comemorativa de 10-o Con-
gresso Brasileiro de Esperanto, organizada pela Liga Esperantista
Brasileira e gentilmente impressa pelo Serviço gráfico do Insti-
tuto Brasileiro de Geografia e Estatística. 18×13,5 cm, 62 p. —
Rio de Janeiro 1945.

M. A. Teixeira de Freitas — O Esperanto no Brasil
— Publicação comemorativa de décimo congresso brasileira de
Esperanto — 18×13,5 cm, 26 p. Rio de Janeiro 1945.
La du lastaj broŝuroj, plaĉe presitaj, estas propagandaj broŝuroj
pri nia lingvo en portugala lingvo. Bibliografia Servo de UEA.

La helpo al la familio Zamenhof.

Dektria raporto: S-ino Zamenhof kaj filo Ludoviko vivas!

Nia lasta (presita) raporto aperis en ESPERANTO 1942, N-ro 492. Informoj aperis poste en la INFORMA BULTENO 1 kaj 2 (1943, 1944). Depost Aprilo 1944 ĉesis ĉia rilato kun Varsovio. Baldaŭ poste okazis la sangoplenaj bataloj en tiu ĉi urbo kio ne lasis grandan esperon ke saviĝu multaj el la loĝantoj. Nenio aŭdiĝis plu, ĝis subite la dekan de junio 1945 ni ricevis depeŝon trans Moskvo kun jena teksto

VIVONS WANDA LUDOVICO SALUONS SUPPLIONS CHERCHER ADAM ET BEAUFRERE HENRI TELEGRAPHIEZ VARSOVIE MYKOTOW LOWICKA 39 A WANDA ZALESKA:

(En Esperanto: Ni vivas Wanda, Ludoviko, salutas, petegas serĉu Adam kaj bofraton Henri telegrafu Varsovion, Mykotow Lowicka 39-a)

Je kio ni respondis ke ni ĝojas pri la informo, kaj faros ĉion kio estas ebla en la afero.

Evidentiĝas nun, ke Sinjorino Zamenhof (kaŝnomo Zaleska dum la germana okupacio en la rilatoj kun la subskribinto) ne plu ion aŭdis pri la edzo D-ro Adam, arestita **Januaro 1940**. Plie malaperis la du fratinoj Lydia kaj Sofja. De F-ino Lydia ni ne plu aŭdis ion depost Aŭgusto 1942. Vera tragedio!

La supran informon ni komunikis al la Internacia Esperanto Ligo, al la Franca Societo por propagando de Esperanto kaj al la arda samideanoj, letere.

Dum Septembro ni ricevis informon ke venis Svislandon S-ino D-rino Szymanska, kun misio por infanhelpe, el Varsovio, portante de persona mesaĝo de Sinjorino Zamenhof al ni. Laŭ tio, S-ino Z.,

laboras kiel okulkuracisto, Ludoviko preparis sin por fariĝi agrikultura inĝeniero (agronomo) sed ambaŭ ege deziras forlasi Varsovion kaj instaligi alilanden, prefere en Britujo. Plie ili petas helpon per sendo de vestaĵoj, bezonaĵoj, ĉiaspecaj, prefere altvaloraj horloĝoj svisaj (ludas rolon de plej serĉata intersangobjekto) Bedaŭrinde ni ne povis tuj prepari ion, la rimedoj elĉerpigis kaj ne estis eble ankaŭ ricevi la necesajn rajtigojn por eksporti certajn objektojn, kiujn ni eventuale estus provintaj akiri. Ni egale komunikis al IEL la informojn, sub formo de protokolo. Plie ni petis D-rin Edm. Privat, veturinte per aviadilo dum Oktobro al Londono, ke li intervenu favore de la lastaj anoj de la Familio de nia majstro. Ĉu ni ripetu kion ni ja ĉiutage legas pri la situacio en la militintaj kaj detruitaj landoj, kie la plej elementaj vivnecesajoj mankas, kie ĉio devas esti rekonstruota, refarota?

Ni do daŭrigas la kolekton favore de la familio Zamenhof kaj akceptas donacojn. Donacemuloj informu nin pri objektoj donacelblaj, ni notos kaj informos poste pri la utiligo. Ni reakceptos mondonacojn pri kiuj ni kvitancos kiel antaŭe.

En venonta numero de ESPERANTO aperos resuma kalkulo pri la tuta helpo depost la unua cirkulero, kiun ni dissendis dum Decembro 1939.

Genève, 31-an de Oktobro 1945.

Hans Jakob, Komitatano de UEA.

Postskribaĵo: Finredaktinte tiun ĉi tekston ni ricevis franclingvan leteron de S-ino Z. datitan 15-an de julio 1945, konfirmante ĉion kion ni supre skribis.

• LINGVAJ STUDIOJ •

Ĉu bohema, ĉu ĉeĥa?

La renaskiĝo de la Ĉeĥoslovaka respubliko ree turnis la atenton de la mondo al tiu ĉi ŝtato okcident-slava, formata de ĉeĥoj kaj slovakoj.

La demando estas ĉu ni rajtas aŭ devas uzi la vorton „bohema“ apud „ĉeĥa“. La sole korekta formo por la popolo kaj por la lando estas ĉeĥa, dume Bohemujo aŭ Bohemio estas historiaj nomoj, arbitre kreitaj.

Kion do signifas bohema? La lingvistoj nin instruas ke en la unua silabo de tiu ĉi vorto (bo-) kaŝiĝas la nomo de la forpasinta kelta tribo de la boi-anoj, okupintaj iam parton de la Supera Germanio, kie ili fondis la urbojn Radisbona kaj Bojodurum, nunaj Regensburg/Ratisbonne kaj Passau. Estis je la 4-a jarcento antaŭ nia epoko, ke tiu ĉi tribo formigris al Italio, forpelis la etruskojn kaj okupis la urbon Felsina nominta ĝin Bononia, la nuna Bologna. Atakinte Romon, ili malvenkis kaj fine post plia migrado fiksiĝis en la lando, poste nomota bohema. La boi-anoj ree forlasis tiun ĉi landon kaj okupis ĝin la markomanoj sub Marbod. Tiam ne estis plu boi-anoj sed la memoro pri ili restis vivanta tiel, ke la markomanoj konservis la nomon Bojerheim, latinigite Boio-

hemum. Kaj el tio fariĝis la germanlingva nomo Böhheim. Kaj tiu ĉi formo konserviĝis en ĉiuj lingvoj, eĉ kiam poste la slava gento, la ĉeĥoj okupis la landon kaj konsekvence nomis ĝin Čechy, kio en nia lingvo estus Ĉeĥio. La konkludo do estas, ke bohema estas historia nomo, uzebla en tekstoj historiaj, dume la korekta nomo de tiu ĉi lando estas Ĉeĥio, ligita kun Slovakio, Ĉeĥoslovakio.

Atentinda lingva detalo estas la maniero laŭ kiuj fremdaj lingvoj alkonformigis la teŭtan vorton Bojerheim t. e. hejmo de la boi-anoj. La franca lingvo diras Bohême (kun cirkumfleksio sur e), dume la loĝanto estas bohémien, kio efektive estus Boi-hejmano Boio-hejm-ano. La germana lingvo nomas la landon Böhmen (laŭsence „das Land zu den Böhmen“) kaj formas la adjektivojn per aldonado de -isch, böhmisch.

En Esperanto ni sekvis similan manieron: **bohem, bohemo, bohema**, Bohemujo aŭ Bohemio. Sed ĉar la radiko bohem' entenas jam la ideon de — land' —, la formo estas same arbitra. stranga kaj erariga kiel en la naciaj lingvoj, pruvo unu plian fojon ke la nura logiko ne kapablas forigi povon pli fortan, la uzadon kaj la kutimon.

Amuziga estas alia detalo: En la nomo de la bavaroj kaŝiĝas ankaŭ la memoro de la kelta tribo boia kun tiu de la avaria. Sed pri tio ni rakontos alian fojon.

G. A.

Kie estas kiu?

Servo de reserĉado, nova servo de UEA.

Kio karakterizis la pasintan militon estis ĝia totaleco absoluta, esprimita per la detruado senegala kaj la neniigo de la loĝantaro en la regionoj kie furiozis la milito kaj la homa krueleco. Tre certe neniam en la sango- kaj larmoplena historio de la homaro, moviĝis tiom da homoj de unu loko al alia, nova popolmigrado. Tiu ĉi popolmigrado komenciĝis per la forpelo de la judoj el Germanujo post la instaligo de la Tria Regno. Ĝin sekvis la civila milito en Hispanujo kaj la persekutado de la judoj en Aŭstrio konkerita, poste en Ĉeĥoslovakio. Cio tio estis nur preludo al okazaĵoj pli aĉaj kaj pli abomenaj, post la jaro 1939. Sisteme la loĝantaroj de okupitaj landoj en oriento kaj okcidento, en sudo kiel en la nordo estis pelataj for el hejmo. Nova ondegaro da homoj fluis el okcidento, la armeoj de liberigo de Britujo kaj de Ameriko., fine la forpelo de la germanoj el orienta kaj suda Eŭropo.

Inter tiuj milionoj da homoj, disigitaj ekzilitaj, forpelitaj, „devigaj“ laborvolontuloj, militkaptitoj civilinternitoj, arestitoj de la GESTAPO, inter tiu ĉi skalo de homa suferado troviĝis kaj troviĝas ankaŭ esperantistoj. De tempo al tempo oni eksciis pri tiu aŭ alia samideano konata al ni, ke li mortis. La spirita blokado, kiun enkondukis la estroj de la Tria Regno senigis nin de novaĵoj kaj informoj el landoj sub ties povo. Iom post iom venas ĝustsimile informoj kaj ni povos baldaŭ formi al ni bildon pri la perdoj, kiujn kaŭzis la milito al nia movado.

Dezirante religi la fadenojn inter diverslandaj esperantistoj, ni opinias utile, krei servon de serĉado, sub titolo „kie estas kiu?“ Ni publikigas en tiu ĉi rubriko la adresojn de esperantistoj elmigrintaj, retroviĝintaj post malapero aŭ izoleco kaj ankaŭ demandoj pri samideanoj serĉataj de alilandaj amikoj. La informoj enpresitaj estas senpagaj, ĉiu kiu deziras ion komuniki, kio povus utili al aliaj, faru tion. Pri la mortintoj esperantistaj dum la milito, ni informas sub la kutima rubriko, en sekvonta numero.

Redakcio de ESPERANTO.

Nuna adreso de:

S-ro Nikolao Dénès, ĵurnalisto, ano de UEA el Budapeŝto, vivinta en Genevo kaj en Parizo, nuna adreso — 10 rue Alphonse Karr, Nice (Francujo).

S-ro Siegmund Freund, longjara delegito de UEA en Breslavo, nuna adreso: Ramoth-Hashavim (Palestino).

S-ro Ernesto J. Farkas (Farkas Ernő) Delegito de UEA en Szeged, Hungarlando, troviĝis je la 10a de Junio 1945 en Linz (Aŭstrio).

S-ino D-ro Janina Ender, filino de la unua delegito de UEA en Lodz, Polujo, petas je helpo, ĉefe pri vestaĵoj, hejmobezonaĵoj. Adreso: Pilsudskiego 14, Lowicz, Polujo.

S-ro Adolfo Grossmann kaj filo Karlo, rifuĝintoj el Lyon al Svislando, revenis Lyon-on, dum septembro 1945.

S-ro Emile Gasse, malnova esperantisto, honora membro de UEA travivis la militon. Nuna adreso: Case 452, Le Havre, S. I. (Francujo).

S-ro Jaume Grau Casas, kataluna poeto esperantista, rifuĝinto el la civila milito hispana, nuna adreso en Francujo: chez M. Gaban, 20 rue Sebilé, Lavelanet (Ariège).

S-ro Rudolf Hromáda, ĉefia pioniro de Esperanto, estinta ano de la UEA komitato, post kvarjara restado en Buchenwald, revenis

je pentekosto, 20an de Majo 1945, hejmen. Praha XIX/14, Socharska 2.

S-ro D-ro Stan. Kamaryt, estinta komitatano de UEA, nuna adreso: Chotebor, Ĉeĥoslovakio.

S-ro Johannes Kalda, DM de UEA el Hapsal, Estonio, rifuĝinto en Svedlando. Adreso lasta: Grand Hôtel, Mölle.

S-ro Eino Loorits, el Tallin, Estonio, Prisoner of War 644 515, Camp no. 9, Great Britain, atendas novaĵojn de edzino, laborinta en fabrikejo en Thüringen, Germanujo. La gepatroj de la edzino, Reinhold Goercke, loĝis en Schwerin, Meklenburgo.

D-ro Wilhelm Solzbacher, estinta aktivulo en la E-movado inter katolikoj, nuna adreso: 11 Lakeview Avenue, Scarsdale, N. Y. (Usono).

Pertelegrame Isaj Dratwer, Varsovio informis (17. X. 45). Revenis de koncentrejo salutojn sendu helpon: Dratwer, Szeroka 5, Warszawa

D-ro Eugeno Kiss, subleŭtenanto, militkaptito, 31 - 3.805.966 U. S. Army, P. W. I. B. France (hungara esperantisto).

Sinjoro Roman Sakowicz, Asnyka 4, Warszawa-Okecie. Salutas kaj petas ke oni sendu gazetojn, legaĵojn.

S-ino F. Staes Vandervoorde, Avenue de la Liberté 11, Koekelberg, Bruxelles (Belg.)

Militkaptito Kurt Sommer, P. d. G. 540 759, Dépôt 189, Bayonne, B. P. (Francujo) Malnova ano de UEA.

Militkaptito Gren. Georg Thiel, B 1752, P. o. W., Camp. 73, Great Britain.

F. D. Ramolfo, Via Nizza 16, Torino (Italio).

Komence de la nuna jaro ni ricevis leteron de nia estinta komitatano kaj kunlaborinto Fritz Rockmann (datitan 7. XII. 44) kies tiama adreso estis Blücherstrasse 26 bei Oberingenieur A. Schlegel Teterow Meklenburgo.

Militkaptito — Soldat Hugo Mulke, Prisoner of war 816 316 289, POW Camp Gordon, 11 Comp., c/o. G. P. O. Box 20 New York, N. Y. USA.

El Praha salutas interalie: F-ino Julie Supichová, pensiita instruistino, Mala Stepánská 11, Praha VI.

S-ro Ernesto Hediger, funkciulo de la Internacia Labor-Oficejo en Genève, redaktinto de la Bulteno de l' I. L. O., membre de la provizora komitato de UEA en 1936: 198 Calle Londres, Mexico D. P.

S-ro Raymond Schwartz, (la ridanta poeto kun larmo en okuloj), 12 rue Castiglione, Paris 1.

S-ro Alfredo Klein, estinta Delegito de UEA en Vieno: Ciudadela 1432-10, Montevideo, Urugvajo.

Pipinić Zdravko, nask. 1924, de Zagreb, oficir-aspiranto en kroata armeo malaperinta 17 Aprilo 1945, supozeble kaptita de angla aŭ usona armeo. Utilajn sciigojn oni volu komuniki al la patrino S-ino Jelka Pipinić, Zagreb, Kosovčeva ulica 3-III-15 (Jugoslavio) — La patrino skribas interalie (en Esperanto):

„Per *Universala Esperanto-Asocio* en 1915 ni eksciis pri lia patro kiam li estis militkaptita en Ruslando. Mi nun provas feliĉon ion scii pri lia filo“.

F-ino Rena Weinsberg el Krakovo, nun: S-ino Rena Lecat-Weinsberg 10 rue Schul, Antverpeno, Belg.

Militkaptito Hermann Kull, Lieutenant-trésorier prisonnier de guerre no. 530 223, dépôt 181, Andernos, Gironde, France. Petas ke oni informu sian fraton, Emil Kull, Stuttgart, 13, Bergstrasse 64, ke li vivas.

Militkaptito Karl Sommer, PdG 540 759, Dépôt 189, Bayonne, B.P., Francujo, estinta ano de UEA 21880, petas ke oni informu la edzinon S-ino Dora Sommer, Dresden A. 28, Deubener Strasse 26, pri lia nuna adreso.

S-ro Karl Baum, estinta Delegito de UEA en Neumark Saksio, militkaptito c/o M. Acker, Bischwiller Alsaco, Chemin de Weilbruch, petegas ke oni informu la edzinon (S-ino Martha Baum, Siedlung Neumark, Sachsen) pri lia nuna adreso.

S-ro Maurice Lefebvre, ano de UEA 14712 de Verdun: Nuna adreso: Place du Marché, La Loupe, Eure et Loire, Francujo.

Jean Laffon, D de UEA, en Toulouse (12 rue de l'Embarthe) deziregas novaĵojn pri lia bopatrino S-ino Laznik-Fridgut en Raskinaj, Litovio.

Civilinternigito Alexis Covalof (Kovalov) (el Rumanujo): Greifenburg 55, Aŭstrio, Kärnten.

Militkaptito Walter Heine, No. 110 172, Lager 10 TA, France, (ano de UEA ĝis la malpermeso de nia movado en Germanujo) petas ke oni informu edzinon (adreso Dresden A. 45, Dieselstrasse 10 g) ke li vivas.

Tra la gazetaro.

La finon de la milito dokumentas ankaŭ okulvideble la alveno de periodaĵoj esperantistaj pli nombran. Ĝi pruvas ke ekzistas ĉie la fortoj por repreni la agadon. Ni informas hodiaŭ pri la periodaĵoj aperintaj kaj en venonta numero ni faros la kutiman resumon de la esp. gazetaro.

American Esperantist — Oficiala organo de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko — Adreso: G. Alan Connor, 114 West 16 th street New-York N. Y. — Dumonata — Abono: 1 Dolaro jare. Bone redaktita propaganda revuo, regule elitanta.

Argentina Esperantisto: Oficiala organo de Argentina Esperanto-Ligo — Adreso: Belgrano 728, Buenos Aires. — Jara abono: 2 fr. svisaj.

Lasta numero ricevita estas tiu de Januaro-Majo 1944, nin atinginta 25an de septembro 1945 (!)

O Brazil Esperantista, oficiala organo de la Brazila Ligo Esperantista — Adreso: Praca da República 54, sob., Rio de Janeiro, — Abono: 1 Dolaro usona aŭ 15 respondkuponoj.

La lasta numero ricevita, de Januaro/Junio 1945, 32 paĝa grandformata sur dika papero riĉe ilustrita, informas pri la deka brazila kongreso de Esperanto, kun reproduktaĵo de la du memorigaj poŝtmarkoj oficialaj unu kun portreto de D-ro Zamenhof.

The British Esperantist — the official organ of the British Esperanto Association — Adreso: 140 Holland Park Avenue, London W. 11. — Abono kun membreco: ses ŝilingoj. — Regule aperanta ĉiudumonte. Lasta n-ro ricevita Septembro-Oktobro 45.

Comprendre, Bulletin trimestriel du cercle Espérantiste Universitaire, Lyon — Adreso (redaktoro) — Richard Levin, 55 Avenue

Félix Faure, Lyon. — Abono: 30 fr. jare. Aperas ĉiutrimonte, grandformate, ciklostile presita.

Esperanto Internacia Oficiala organo de Internacia Esperanto Ligo — Adreso: Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. — Aperas regule ĉiudumonte. Lasta numero ricevita Septembro-Oktobro 45.

Flandra Esperantisto — Tijdschrift voor Esperanto — Onderwijs en propaganda — Adreso: Flandra Esperanto Instituto, Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West — Postrekening 3268-51 (Poŝtekkonto) Abono: 36 fr. jare. — Grandformata bone presita periodaĵo, regule aperanta ĉiudumonte — En junia numero tre simpatia artikolo pri Hector Hodler kun bildo — Lasta numero ricevita: Septembro 1945.

Franca Esperantisto — Organe officiel de l'Unio Espérantiste de France et des colonies — Adreso: 34 rue de Chabrol, Paris 10. numero ricevita estas tiu de Marto-Aprilo 1945, la kvara post la liberigo. —

— Abono (eksterlande) 80 fr. fr. — Aperas laŭ eblecoj — La lasta **Heroldo de Ĉinio** Adreso: P. O. Box 175, Cung-king — Tiu ĉi entute primilita periodaĵo, presita sur rizpapero kaj sendita regule al ni letere per aerpoŝto, tamen atingas nin nur monatojn poste. La lasta numero kiun ni ricevis dum Junio 1945 estas tiu de decembro 1944.

Irlando vokas — Adreso: Lorcan O hUiginn, Dundrema, Dublin Irlando — Ciklostile presita per Gestetner maŝino —

La juna vivo — monata organo de tutmonda junular-organizo — Adreso: E. van Veenendal-Bouwes, Limmen, Nederlando. Abono: Lasta numero ricevita: 93 — Septembro 1945.

Per unu voĉo — Organo de la Laborista Esperanto — Kunularo — Adreso: P. O. Box 7536, Johannesburg, Sudafriko. — Abono: 3 ŝilingoj — Lasta numero ricevita Septembro 1945. Ciklostile presita.

La Semanto, monata organo de la svisaj laboristaj esperantistaj Adreso: Rue Couchirard 8, Lausanne — Abono: 2 fr. jare. Ciklostile presita. Lasta numero ricevita: Oktobro 1945.

Semu konstante Monata organo, Esperanto-Instituto Malnova turo — Adreso: Venkelstraat 15, Eindhoven, Nederlando. Abono: 1,50 Guldeno. — Ciklostile presita —

Svenska Esperanto-Tidningen, — **LA ESPERO** — organ for Svenska Esperanto — Förbundet — Adreso: Postfack 19071, Stockholm 19. — Abono 4 kr. jare — Lasta numero ricevita: Oktobro 1945. Aperis regule dum la tuta milito, sed ne ĉiuj numeroj atingis nin.

Svisa Espero — oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo — Adreso: Neuveville, J.B. — Jara abono, ok numeroj fr. 2.50 — Lasta numero ricevita, (7) Oktobro 1945. — Ciklostile presita —

Tuluza Stelo: Adreso: 12 rue d'Embarthe, Toulouse, Francujo Propaganda folio franclingva eldonita de la Esperantista Grupo de Toulouse. Abono: 4 fr. la numero — Lasta numero ricevita: Septembro 1945.

Esperantista Akademio

Riouwstraat 169, Den Haag

La prezidanto de la Akademio, Sinjoro Ir. J. R. G. Isbrücker, invitas la anojn de la Lingva Komitato anonei sin al li por la repreno de la laboro.

— Aŭskultu Praha. —

Ĉeĥoslovaka Radio disaŭdigas depost la 16 IX. 1945 ĉiun lundon kaj ĵaŭdon, 22.20-22.30 horo, esperantlingve informojn politikajn, kulturajn kaj ekonomiajn pri Ĉeĥoslovaka Respubliko, per stacio Praha I / Ondoj 407,2 m kaj 1571 m. / Aŭskultu kaj konfirmu la aŭskulton al Radio en Praha XII, Stalin-strato 12.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

PALAIS WILSON - GENÈVE (SVISLANDO)

Oficiala Informilo 1946 (1)

Adreso de UEA. Gis plue validas la sama adreso, Palais Wilson, Genève, telefono 2.30.34. Personoj dezirantaj renkonti la Administranton bonvolu sin anonci antaŭe por fiksi tempon de rendezvoo.

Komitato de UEA. La atingeblaj komitatanoj, demanditaj per cirkulerletero dum Junio 1945 akceptis la proponitan agadplanon de la Estraro de UEA. Respondis al ni la jenaj komitatanoj: (ekster Svislando) S-ro Daniel Chagnoux, 12 rue Rosa Bonheur, Yzeure s. Allier. S-ro Joseph W. Dubin, 34 S. 16 th Street, Philadelphia, Pa. Usono. S-ro Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki K. ä., Finnlando. S-ro A. W. Thomson, 35 Dallin Road, Bexleyheath, Kent, Britujo. Ni ricevis longan leteron de nia pola komitatano D-ro Czubrynski, loĝante en Wlochy apud Varsovio. Spite la travivaĵoj, li deklaras sin preta daŭrigi la laboron. Kaj hodiaŭ (24 an de Oktobro) ni ricevis kelkvortan informon de nia longjara amiko Radomir Klajić el Beograd, kiu deziras informojn. Al li ni povis jam sendi leteron pere de la Svisa Saneca Misio, forlasinta Genevon 21an de Oktobro kaj kiun partoprenas fervora geneva samideano, René Buchenel, estinta oficisto de UEA.

La kvar svisaj komitatanoj estas konfirmitaj en ilia tasko kaj estas ilia unua klopodo normaligi la juran situacion de la Asocio.

Cefdelegitoj de UEA. Jam deklaras ree kunlabori la jenaj ĉefdelegitoj kaj perantoj:

Britujo: A. E. Hepton, Cottingham, Yorkshire.
Ĉeĥoslovakio: (Peranto) — Frant. Slavik, Praha.
Nederlando: CD: J. Telling, Rotterdam.
Svedlando: CD: Einar Adamson, Göteborg.
Portugalo: CD: Manuel de Freitas, Porto.

Delegitoj de UEA. La Delegitoj oficantaj ĝis 1942 kaj pretaj daŭrigi la oficon, bonvolu sin anonci ĝe la Centra Oficejo. Jam deklaris sin pretaj ŝatinda nombro da samideanoj kaj en venonta numero de la gazeto ESPERANTO aperos unua listo.

Propaganda Servo. Tiu ĉi servo, kiu ĉefe konsistis en la eldono de samformaj, samformataj, normigitaj propagandiloj en diversaj lingvoj kaj la eldonigon de la ŝlosiloj, ree funkcias. Pri la eldono de nacilingvaj propagandiloj ni informos en unu el la venontaj numeroj de ESPERANTO.

Ŝlosiloj de UEA estas livreblaj nun en jenaj lingvoj: Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Juda, Malaja, Nederlanda, Norvega, Portugala, Irana, Romanĉa, Rumana, Rusà, Slovaka, Slovena, Sudafrika, Sveda, (entute 28 lingvoj) Tuta kolekto 4.50 Frk. (Elĉerpitaj estas momente: Bulgara, Kroata, Latva, Litova, Pola, Ukraina).

Premioj 1946. Kiel antaŭe, ni intencas konsenti al niaj daŭrigi la oficon, bonvolu sin anonci ĉe la Centra Oficejo. vos konigi la liston de 1946.

Kotiz-tabelo kaj pagmaniero

Estas citataj nur la landoj atingeblaj. Abono sen membreco, sama prezo kiel MA.

Argentinio	Pes.	2.50	8.25	20
Aŭstralio	Ŝil.	4	10	25
Belgio	Fr.	50	100	250
Brazilio	Milr.	12	30	80
Britlando	Ŝil.	4	10	20
Bulgarujo	Leva	50	125	350
Ĉeĥoslovakio	Kĉ.	50	100	250
Ĉinujo	Dol.	3	7.50	20
Egipto	Ŝil.	4	10	25
Finnlando	Fmk.	50	100	250
Francujo	Fr. fr.	50	100	250
Hispanujo	Pes.	8	20	50
Italujo	Lir.	50	100	250
Nederlando	G.	2.50	5	16
Novzelando	Ŝil.	4	10	25
Palestino		Laŭ brita tarifo,		
Portugalo	Esk.	15	40	100
Svedlando	Kr.	5	10	20
Svislando	Frk.	5	10	20
Urugvajo	Pes.	2.50	5	20
Usono	Dol.	1	2.50	5

ĈD: Daniel Quarello, Casilla de Correo 47 (Suc. 13) Buenos-Aires.
Rekte al C. O. de UEA.
Universala Esperanto-Asocio, Poŝtĉekkonto 184 200, Bruxelles.
Oni povas pagi al ĈD. portugala, aŭ rekte al UEA.
ĈD: A. E. Hepton, 10 Linden Ave., Cottingham, Yorkshire.
Informo sekvas pli poste.
Peranto: Frant. Slavik, Praha, Uralské 9, poŝtĉekkonto 16204
Oni pagu rekte al C. O. de UEA, Genève.
Rekte al C. O. de UEA.
Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.
UEA poŝtĉeko Lyon, 221.76 (Universala Esperanto-Asocio)
Peranto: Fernando Montserrat, Provença 79, Barcelona.
Rekte al C. O. de UEA.
ĈD: J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam poŝtĉekkonto 2416.19
ĈD: L. E. Dust, 20 Chelsea Str. Miramar, Wellington E-4.
Peranto: Fino Selma Moscicki, 25 Zefania str Jerusalem.
ĈD. Manuel de Freitas, Rua Monte da Lapa, 49-1. Porto.
Bokförlaget Kosmos, för Universala Esperanto Asocio, poŝteka konto 44381, Göteborg. (Korespodajoj al Einar Adamson, Värmlands-gatan 18, Göteborg.)
Rekte al C. O. de UEA. Poŝtĉeko: Genève I 2310.
Al S-ro Alfredo Klein, Ciudadela 1432-10, Montevideo.
ĈD. J. Dubin, 34 S., 16 th Street, Philadelphia, Pa.

Internacia Korespondado.

Parolante, korespondante kaj legante, la nova esperantisto akiras certan gradon de perfekteco en la lingvo. La korespondado en nia lingvo nun reprenas sian antaŭan amplekson. Anonco en tiu ĉi rubriko estas senpaga por la membroj de UEA, aŭ 1.— fr. sv. pagebla en neuzitaj poŝtmarkoj ĉiulandaj (3 foje la afranko de letero al eksterlando) — Ĉiu anoncanto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al ricevita korespondaĵo pere de tiu ĉi anonco. Mallongigoj: PI = poŝtkartoj ilustritaj, L — letero, PM = poŝtmarkoj, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj.

Amsterdam W (Nederlando) — S-ro J. Henk Greif, Elegaststraat 7 PM.

Ceskâ Skalice (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Odon Horák, serĉas sciozan korespondanton en Svislando por interŝanĝi PM.

Den Haag (Nederlando) S-ro H. S. Goudsmid, Groenkweg 18, 22 jara judo, lerninte Esperanton dum 2½ sinkaŝado dum la okupacio, deziras kontaktiĝi kun ĉiulandaj samideanoj.

Den Haag (Nederlando). — S-ro C. P. van Rijn, Charlotta de Bourbonstraat 146 B, L., PI kun svisaj samideanoj.

Herni Počernice II (Ĉeĥoslovakio). — S-ro Lubor Mairich, Zizkova ul. 295 PI., L. k. ĉ. l.

Krhová 126 Ĉeĥoslovakio. p. Krásno n/B). — S-ro Al. Halas, L., PM.

Liberec 3 Ĉeĥoslovakio). — S-ro Ladislav Blecha, stacidomo Zásobárna, ČSD; PI; L., pri ĉiuj temoj, poste il gaz; PM Fot-ajojn, librojn.

Librec V (Ĉeĥoslovakio). — F-ino Zdenka Blechová Pestalozziova 235/16, PI; L., kun svisaj samideanoj.

Proseč n. N. — (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Rony Janečka, n-ro 446, PI., L; k. ĉ. l.

Usti nad Labem. — (Ĉeĥoslovakio). — S-ro Václav Novák, Postovni úrad (poŝtoficejo), PI, Fot-ajoj, PM.

Valls (Hispan., Tarragona). — S-ro José M. Ventura, arrabal Sant Antonio 124, L., pri orto, filozofio, literaturo, klasika muziko.

Vicenza (Italio). — S-ro Luigi Schettin, Via del Quartiere 11, PI., L.

Zlín (Ĉeĥoslovakio). — S-ro Miloš Krivda, studento, Zalesná VI-1313, PI., L., pri ĉiuj temoj.

Zlín (Ĉeĥoslovakio). — S-ro J. Maškovsky, Stalinova tr. 33 PM kun ĉiuj europaj landoj, reciproka interŝanĝo de novaĵoj je nominala prezo. Kun ceteraj landoj aer-PM kaj folietoj.

Reprezentado

de SVISA firmo eksportanta motorojn, motorbiklojn, estas akceptata de

Ernesto Vána, Zilina, Ĉeĥoslovakio.

Jaro 1946

ALIGILO.

38-a jaro de UEA

Mi deklaras per tio ĉi mian aliĝon al Universala Esperanto-Asocio kiel

Membro — **Membro-Abonanto** — **Subtenanto** — **Dumviva Membro** — **Abonanto sen membreco**

kaj pagas la rilatan kotizon de _____ laŭ la tabelo de kotizoj al poŝtĉeko - ĉefdelegito-peranto _____

Ĉar en mia loko ankoraŭ ne estas Delegito de UEA, mi deklaras min preta akcepti tiun-ĉi taskon — mi proponas al vi nomi kiel

Delegiton de UEA _____ ĉar mi mem ne povas plenumi la oficon.

Mi deziras ke mia nomo estu anoncata por korespondi laŭ jena teksto:

Loko kaj Dato: _____ Subskribo: _____

Transdonu aŭ sendu tiun-ĉi aliĝilon al tiu al kiu vi pagas la kotizon.

